

NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3°-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

NOVEMBRO 2002

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3°-7 Tel. 91 446 80 79

ESPERANTO-LERNEJO

Augusto Casquero instruos la hispanan lingvon kaj kulturon dum la kurso 2002/2003 en la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz (Pollando). La instruado okazas en esperanto kaj la titoloj estas subskribitaj de la Internacia Akademio de la Sciencoj de San Marino. Pasintjare lernis 180 gestudentoj el 11 landoj)

PIV

La novan eldonon de Plena Ilustrita Vortaro, 1265 paĝoj, 17.000 kapvortoj kaj ĉirkaŭ 47.000 leksikaj unuoj, estas la plej ampleksa vortaro de la internacia lingvo, nun reviziita kaj ĝisdatita. SAT eldonis tiu kolektiva verko de ĉirkaŭ 150 kunlaborantoj. Madrida Esperanto Liceo faros komunan peton kun speciala prezo nur por vendi en Madrido (antaŭ-pago necese, 65 euroj, inkludas impostojn)

KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

La **Esperanta PEN Centro** estis reprezentita per du-persona delegacio en la 69-a mondkongreso de **PEN Klubo Internaca** en Ohrid (Makedonio) inter 17-24 septembro 2002. Giorgio Silfer kaj Ljubomir Trifonchovski partoprenos en la laboro de la Asembleo de la monda organizo de profesiaj verkistoj kaj de la komisionoj "Verkistoj por paco" kaj "Tradukado kaj lingvaj rajtoj". Konsiderante ke la kongreson partoprenos ankaŭ denaska esperantisto Johano Strasser (kiu gvidos la delegacion de la germanaj verkistoj) kaj prof. Ghorghi Marjanovich (kiu estos kadre de la makedona delegacio), niaj samlingvanoj en Ohrid estos almenau kvar. Ĉiuj delegacioj en Ohrid ricevis la aŭgustan numeron de revuo "Literatura Foiro", kiu estas organo de la Esperanta PEN Centro. Por la amaskomunikiloj estas preparita speciala flugfolio, en la makedona lingvo, pri la aktivado de la Esperanta PEN Centro, ili ricevis ankaŭ ekzemplerojn de la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj, kiu aperis en esperanto. La ĝenerala Asembleo de la Esperanta PEN-Centro, decidis prioritare aktivi por la kandidatigo de William Auld al la Nobel-premio pri literaturo.

EN MADRIDO DU NOVAJ STRATOJ PORTOS ESPERANTISTAJN NOMOJN

HEF kaj Madrida Liceo skribis leteron al la Urbodomo apogante la peton de omaĝo al **Cayetano Redondo**, esperantisto kiu estis urbestro de Madrido dum la hispana milito, kaj profitante la okazon por peti omaĝon ankaŭ por du aliaj historiaj esperantistoj: **Julio Mangada kaj Emilio Herrera**. La urbeŝtraro skribis al Liceo, en la letero aperas la konfirmon ke strato de nova kvartalo en Madrido, Sanchinarro (Fuencarral), portos la nomon Alcalde Cayetano Redondo. Pri la du aliaj, jen la respondoj: Mangada. Medalla de Oro por acuerdo 21-8-1936 "*quedando de esta manera ampliamente reconocida y honrada su figura*". Emilio Herrera "*cuya trayectoria, sin duda, fue relevante, no parece actualmente el momento oportuno para efectuar su reconocimiento al no coincidir ningún aniversario o efemérides que conmemorar en relación con su biografía*". Pri tiu ĉi lasta afero, la Fondaĵo Herrera konfirmis al Tonyo del Barrio ke venontjare estos la 100jara datreveno de la aviado en Hispanio, kaj oni kunmemoros ĝin vaste; tial, ili mem petos agnoskon por la figuro de Herrera. Pri Mangada, estas klare ke ni mem devus organizi ĉion. Intertempe, mi trovis anoncon en oktobro 1936 en ĵurnalo "La Voz", fare de Hispana Esperanto-Asocio, petante donacojn por starigi al "generalo" Mangada la tabulon pri kiu ni parolis en aliaj NV-numero. Sed ni ankoraŭ ne trovis mencion pri la starigo mem de la "fama tabulo".

NIA VOĈO

NOVEMBRO 2002

Kaj kial en la titolo ni parolis pri "du" stratoj?: Ĉar en la mapo de la menciita kvartalo Sanchinarro alia strato portos la nomon de prezidinto de Unua Respubliko Pi i Margall, ŝajne la unua kiu publike parolis pri Esperanto en Hispanio. (Raportas Tonyo del Barrio)

LA LABOROJ DE LA EEU-KOMITATO

5a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio (Verono, 23-28 Aŭgusto 2002) Dum la kongreso okazis du laborkunvenoj de la komitato de EEU, en kiu ĉeestis reprezentantoj de Hispanio, Francio, Italio, Belgio, Nederlando, Germanio, Finnlando, Aŭstrio, plus la sekretario de la Brusela Komunikad-Centro, David Ferguson. La hispana reprezentanto prezentis inviton de la Hispana Esperanto-Federacio organizi la venontan EEU-kongreson en la jaro 2004 en Hispanio, en BILBAO. La invito estis principe akceptita. La komitato detale diskutis pri teksto de rezoluci-propono, kiu estis prezentita en la ĝenerala publika kunveno kaj tie unuanime aprobita. Jen la teksto:

Post ekzamenado de la nuna lingva situacio en Eŭropo, ankaŭ vide al la baldaŭ okazontaj plivestigxoj de Euxropa Unio, asertas la gravecon por Euxropo, kaj la tuta mondo, de efektiva lingva egaleco kaj de protektado de lingva diverseco.

Plie, la Kongreso esprimas sian kompletan konsenton kun tiuj principoj de lingva egalrajteco kaj de protektado de lingva diverseco esprimataj en la diversaj naciaj, internaciaj kaj eŭropuniaj traktatoj kaj bazaj leĝoj, kaj specife en la Konkludoj de la Konsilio de Ministroj, kunvenintaj en Luksemburgo, la 12an de junio 1995 pri "Lingva Diverseco kaj Plurlingvismo en la Eŭropa Unio", kaj konfirmitaj en januaro 2002.

La Kongreso devas tamen rimarkigi ke la lingva diskriminacio kaj malegaleco pli akriĝis en la lastaj jaroj, malgraŭ la laŭdindaj intencoj esprimataj en la diversaj traktatoj kaj bazaj leĝoj. Plie, ĝi notas ke kreskadas premado sur eŭropanoj ne nur por ke ili akceptu la ideon ke la komuna lingvo de Eŭropo estas jam la angla sed ankaŭ por ke ili investu multe da tempo kaj da mono por lerni la anglan. Malgraŭ tio estas elstare favorataj la civitanoj denaske anglalingvaj, ankaŭ en la aliro al laborpostenoj de euxropaj organizajxoj kaj entreprenoj.

Tial la Kongreso - ja agnoskante la gravecon, en multaj situacioj, de lernado de naciaj lingvoj - tamen rimarkigas ke por la plej multaj civitanoj estus ege utile havi komunan lingvon relative facile lerneblan kaj por neniu diskriminaciantan.

La Kongreso opinias - surbaze de la sperto akumulita dum pli ol cent jaroj - ke neŭtrala planlingvo, kia estas Esperanto, povus disponigi realan bazon por plifaciligi egalrajtan komunikadon inter eŭropanoj.

La Kongreso do invitas la Eŭropan Komisionon, kaj la naciajn registarojn en Eŭropo, plenumi, kiel eble plej baldaŭ, la volon esprimitan en la Konkludoj de la Konsilio de Ministroj en 1995 pri "Lingva Diverseco kaj Plurlingvismo", kaj konfirmitan en januaro 2002, kaj starigi konstantan konferencon de naciaj reprezentantoj, spertuloj, kaj politikistoj, kiu esploru ĉiujn opciojn, inkluzive de tiu proponita de la internacia lingvo Esperanto, ankaŭ aranĝante laŭcelajn eksperimentojn.

Konklude, la Kongreso asertas ke la principo de reala fakta egalrajteco, ankaŭ lingva, inter ĉiuj civitanoj de la Unio, estas enskribenda en la konstitucian tekston, kiun la Konvencio estas preparanta kaj plej eble baldaŭ realigenda.

.....

ESPERANTO LICEO DE MADRID

San Alejandro 6-4ºB. Ext

28005 Madrid

Asociación de Utilidad Pública Municipal